



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio*  
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jaro n-ro 3

*Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.*  
*Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.*

*Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.*

## AGADO EN LA MALPROKSIMA ORIENTO

*En „N.E.” de decembro 1963 ni publikigis artikolon pri la por-esperanta laboro de f-ino M. Haudebine en Hindujo. Fine de 1966 la redaktoro de N.E. ricevis cirkuleron, kiun li ĉi-sube presigas. (iom mallongigita). La kuraĝa, pionira laboro de f-ino Haudebine meritas ĉies atenton.*

Pro mia tro longa silentado mi devas skribi al vi pere de cirkulero, kaj petante pardonon, mi kuraĝas esperi, ke vi senkulpigos min, eksciante, kiom multe okupata mi estis dum mia tuta restado en Hindujo.

Kvankam estis projektite, ke mi restu tie nur unu jaron, la cirkonstancoj devigis min resti en tiu lando 6 kaj duonan jarojn. Ne estas eble nun priparoli detale miajn multajn diversajn okupojn, tre variajn, nek miajn malfacilaĵojn rilate al ili, ĉar mi devis lukti preskaŭ sola kaj pagi mian poresperantan laboron pere de franclingvaj lecionoj.

Mi nur diru, ke mi gvidis precize 30 kursojn en Delhi, New Delhi kaj ties foraj kvartaloj. Okaze de internaciaj konferencoj mi preparis informilojn kaj tradukigis ilin anglalingven, tajpis, multobligis kaj disdonis ilin. Plurloke mi faris paroladon pri nia lingvo, redaktis informan libreton pri Hindujo kaj verkis kaj prizorgis korespondan kurson. Korektante la taskojn de miaj lernantoj, mi ekorespondis kun ili, ankaŭ kun izoluloj, dissendis gazetojn kaj informilojn al interesiĝantoj, akceptis

aliurbajn aŭ eksterlandajn esperantistojn, k.t.p.

Dum vojaĝo kun lernantino en Kerala, la plej suda ŝtato de Hindujo, mi prelegis pri Esperanto en kolegioj de diversaj urboj, parolis por la radio kaj havis diversajn intervjuojn kun la lokaj jurnalistoj. Tio vekis grandan intereson kaj venigis miajn unuajn perkorespondajn lernantojn.

Du biciklaj akcidentoj en 1963 tre ĝenis mian laboron ĝis mi povis denove marŝi preskaŭ normale. Dume lernantino klopodis instrui, kaj nuntempe denove tion faras, en Delhi kie, post mia unua kurso tie, fondiĝis biblioteka klubo.

Kreiĝis ankaŭ la Hinda Instituto de Esperanto (adreso: P.O. Box 604, New-Delhi-1, Hindujo), kiu laboras - tute sen mono, bedaŭrinde - dank' al la sindonema sekretario, al kiu mi lasis multe da farotaĵoj.

La 6-an de julio 1965 mi enŝipiĝis en Bombay por Kobe en Japanujo, sed pro akcidento al la ŝipo apud Singapuro, mi ekflugis de tie la 16-an kaj alvenis samtage en Tokio. Tie mi partoprenis la Universalan Kongreson kaj venis poste al Kameoka, ĉe Oomoto, kiu okazigis postkongresan festivalon.

De septembro ĝis la mezo de decembro mi gvidis kursojn por komencantoj . . . En oktobro mi gvidis semajnfinan seminarion por diskonigi la Cseh-metodon, en suddurbo de la centra parto de la lando.

## ASOCIAJ INFORMOJ

ĈEFESTRARKUNVENO de 5-2-1967 en Amersfoort. S-ro Beekhuysen pro malsano ne povis ĉeesti. Pritraktitaj estis i.a.:

- 1e. diversaj aferoj kun rilato al la venonta jarkunveno (proponoj, kandidatoj, financa raporto, buĝeto, asocia jarraporto de la ĝenerala sekretariino)
- 2e. skriba kurso
- 3e. varbado por UEA (membroj, delegitoj)
- 4e. letero de f-ino Mulder per kiu ŝi anoncis ekŝigi el L.E.E.N. kaj el la Ekzamenkomitato.

**Proponoj por la jarkunveno (27-5-1967)** en Gebouw van Kunsten en Wetenschappen, **Mariaplaats** en **Utrecht**.

### Ĉefestraraj proponoj:

- 1e. alia sistemo de protokolado de la jarkunvenoj: anstataŭ elekti du protokolantojn el la ĉeestantoj estonte 2 ĉefestraranoj protokolos. Motivo: estas fakto ke protokoli kunvenojn (speciale jarkunvenojn) de personoj kiuj ne sufiĉe estas kutimiĝintaj al tia laboro ne glatigas la laboron de la ĉefestraro. La prezidanto preskaŭ ĉiam dum la lastaj jaroj devas doni multe da tempo por korekti kaj verki la deziratan formon. Krome estas esence, ke la protokolo nepre aperas en N.E. inter du monatoj post la jarkunveno.
- 2e. esplori la eblecojn krei specialan diplomon (ekzamenon) por Esperanto Komerckorespondado (trovi Esperantisto(j)n, kiu(j) kapablas kaj pretas verki tiurilatan studlibron).

Komence de la nuna jaro mi instruis denove en Kameoka kaj Kioto por komencantoj kaj daŭrigantoj kaj en ĵus fondita klubo en Takacuki, por komencantoj. De tempo al tempo mi preparis artikolojn por esperantaj aŭ japanaj gazetoj. Tial ke ĉiuj kursoj kaj adiaŭaj vesperoj ĵus finiĝis, antaŭ ol repaki, mi rapidas pretigi ĉi tiun cirkuleron, dissendotan iom post iom dum miaj baldaŭaj seminarioj, diversloke tra la lando. Kun bondeziraj rilato al via sano, mi plej sincere vin salutas!

M. Haudebine.

3e. (P.M.) ŝanĝo de tiuj artikoloj de la „Alg. Huish. Regl.” kies enhavo koncernas la bibliotekon. P.M. pro la fakto, ke la prezidanto ĝis nun ne povis trovi sufiĉan tempon por pristudi la proponotan tekstŝanĝojn. Espereble la ellaborita ŝanĝo aperos en la venonta numero de N.E.

### Sekciaj proponoj:

- 1e. Por la 2 vakantaj lokoj en la ĉefestraro venis 4 nomoj de kandidatoj. *Hilversum* kandidatigas f-inon Drs. A. J. Middelkoop el Hilversum kaj *Deventer* kandidatigas s-ron T. S. Kho el Voorburg. Rotterdam-Merkurio kandidatigas s-inon P. E. van der Werff-Geldmaker, kaj Arnhem kaj Krommenie kandidatigas s-ron O. Hoekstra el Schoorl.
- 2e. La sekcioj Leiden, 's-Gravenhage, Haarlem, Den Helder, Hilversum, Amsterdam, Rotterdam (Merkurio), Deventer kaj Leeuwarden proponas ke la ĉefestraro faru la necesajn paŝojn por realigi la ideon de s-ro Valkenburg pri *komuna esperanto-gazeto* en Nederlando (bv. legi la tiurilatan artikolon „Publika Letero al F.E.N.” en N.E. oktobro 1966-a, paĝon 94-an). Opinio de la ĉefestraro: Unuanime la ĉefestraro povas subteni tiajn proponojn, sed reale pensas al la diversaj malfacilaĵoj kiel i.a. por vera kaj sincera interkonsento ne sufiĉas, ke unu el la koncernaj asocioj estas preta spontane fari tion, ankaŭ la aliaj asocioj en Nederlando devus montri la seriozan pretecon por havigi unu komunan gazeton; la financa flanko; komuna redakcio, ktp.
- 3e. Sekcio 's-Gravenhage proponas denove revigi ĉiujarajn kongresojn naciajn por ĉiuj nederlandaj Esperantistoj kun ebleco por eksterlandaj Esperantistoj ankaŭ partopreni. Motivo: por multaj Esperantistoj la Internaciaj kongresoj okazas en malproksimaj landoj (Tokio, Sofia, Budapeŝto, ktp) kaj pro tio tre multekostaj „libertempoj”. Devas esti ebleco, ke almenaŭ en Nederlando la Esperantistoj povas renkontiĝi, ankaŭ en aliaj landoj oni organizas landajn kongresojn. Opinio de la ĉefestraro: la ĉefestraro povas havi komprenon por tia situ-

acio, sed . . . realigo dependas de la preteco kaj aktiveco de sekcioj por organizi tian kongreson ie en Nederlando.

### Elektio Komitatanoj A por U.E.A.

En 1967 nia ĉefestraro denove devas elekti komitatanojn „A” por la sekvontaj 3 jaroj. En 1964 ni elektis sinjorinon E. Kervers-van Tholen kaj sinjoron E. J. Woessink. Konforme al Art. 41 de la Interna Regularo la estraro petas la sekciojn ensendi nomojn de kandidatoj kiel eble plej baldaŭ. Necesas, ke la elektotaj komitatanoj estis membro abonanto de U.E.A. dum la pasintaj tri jaroj. Ili krome devas esti personoj kiuj kutimas sufiĉe regule viziti la Universalajn Kongresojn kaj estas pretaj oferi multajn horojn de la kongresa semajno por ĉeesti la kunsidojn. Ĉiu kandidatigo devas esti akompanata de rekomendilo de la sekcio kaj letero de la kandidato, ke li akceptas eventualan elekton.

### Informa Fakoj.

Prizorganto de la Informa Fakoj nun estas sinjoro T. Boersma, Borniastraat 95, Leeuwarden. (Vido paĝo 99 de la novembro numero de „N.E.”). La sekcioj nepre sendu siajn informojn pri la agado de la kluboj kaj opaj personoj rilate al la propagando por Esperanto al S-ro Boersma. El tiuj li verkos raporton por U.E.A.

### Helsingör

La internaciaj feriaz Esp.-kursoj okazos 23—30 de julio en la internacia Altlernejo (tute-modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
Abyhöj, Danlando.

N.B. Aŭtunaj feriaz Esp.-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 15—21 de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

## EL LA SEKCIOJ.

**Lando-vespero pri Israelo je la 31-a de januaro en Anne Frank-domo.**

La amsterdama kunlabora komitato A.K.K.E. nun dufoje aranĝis nederlandlingvan kunvenon pri la lando de la Universalaj Kongresoj. Per tio ni volas konigi al neesperantista publiko kelkajn faktojn pri Esperanto, sed samtempe havigi al la samideanoj interesan kaj agrablan informadon pri la kongreslando. Al tiuj aranĝoj ni invitas membrojn de neesperantistaj unuigoj, kiuj dum la kunveno i.a. aŭdas la praktikadon de Esperanto, ĉar ĉeestantoj ofte spontanee konversacias en Esperanto. Antaŭan jaron, pri Hungarujo do, la kunveno bone sukcesis. Ĉi tiun jaron plenigis la salonon pli ol 130 personoj, kaj devis ni rifuzi eniron al aliaj, ĉar la salono estis plenplena. La programo konsistis el prelego de s-ro Arad, direktoro de la Israela Nacia Turistoficejo, kaj du interesaj filmoj pri Israelo; parolado pri Esperanto kaj la kongreso de s-ro H. Bakker, patro, kaj la bona rapidflua esperantlingve parolata filmo „Renkonto kun Fiat”. Fine la parolintoj kaj s-ro Hoekstra el Schoorl respondis al demandoj.

Ni ĝojis, ke ĉeestis la kunvenon ankaŭ la sekretario de F.E.N., estraranoj kaj membroj de aliaj sekcioj, inĝ. Klage kun kelkaj kolegoj de Eŭratom en Petten, kaj membroj kiuj ĝenerale ne trovas tempon por viziti niajn kunvenojn. S-ro Ruig iu grandparte aranĝis la programon kaj gvidis ĝin, certe rajtas esti kontenta.

W. Z.

### INĜ. J. R. G. ISBRUCKER †

19-7-1889

20-1-1967

En la lastaj monatoj forpasis kelkaj eminentaj membroj de nia asocio, gravaj kunlaborintoj en la landa kaj internacia movado. Sekvis ilin s-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker, mortinta la 20-an de januaro pasinta en la aĝo de 77 jaroj.

Li povas esti kalkulata inter la pioniroj de la nederlanda Esperanto-movado. Ek-lerninte la lingvon antaŭ jam la unua mondmilito, li tuj plenumis diversajn funkciojn en la loka movado en Hago. Estis tie ke li konatiĝis kun f-ino J. C. Dirksen, same grava aktivulino; ili geed-

ziĝis en 1915 kaj de post tio dediĉis preskaŭ sian tutan vivon al Esperanto.

Precipe dum la jaroj inter la du mondmilitoj oni renkontis lian nomon en ĉiaj komitatoj, ĉu landaj ĉu internaciaj, ofte kiel prezidanto. Jam frue li fariĝis ekzamenanto en la de L.E.E.N. iniciatita Ekzamena Komitato, kaj poste dum multaj jaroj li funkciis kiel ĝia prezidanto. Li prezidis la unuan postmilitan Universalan Kongreson (1920) en Hago. En la Universala Esperanto-Asocio li plenumis multajn gravajn laborojn kiel ano/estrarano en la iamaj Konstanta Repraesentantaro kaj/aŭ Centra Komitato. En preskaŭ ĉiuj Universalaj Kongresoj oni vidis lin.

Dum multaj jaroj li reprezentis tie ankaŭ la nederlandan registaron kaj alparolis en ĝia nomo la kongresanaron.

Kiel multjara membro kaj poste kiel prezidanto de la Akademio de Esperanto li montriĝis saĝa senpartia homo, montranta prudenton kaj dignecon.

En sia privata vivo s-ro Isbrucker estis docento en Alta Teknika Lernejo; tie li gvidis multajn Esperanto-kursojn inter la lernantoj. Kun aliaj konataj esperantistoj li kompilis kaj eldonis diversajn propagandajn broŝurojn, defendis la internacian lingvon en kunvenoj kaj antaŭ la radio.

Ne nur en organizaj aferoj li brilis. Ankaŭ sur lingva tereno li rikoltis laŭrojn pro kelkaj tiutempe rimarkindaj tradukoj; mi menciu i.a. *Akbar* (kune kun J. Ziermans) kaj la gigantan verkon de *Vondel*, *Gysbrecht van Aemstel*, laŭ versa metriko preskaŭ simila al la originalaĵo. En 1932 li aperigis la unuan eldonon de *Historio kaj Organizo de la Esperanto-movado*; poste en kunlaboro kun Stöp-Bowitz eldoniĝis *La Esperanto-movado*. En 1928 aperis lia verketo *La evoluo de telefonio*.

Post la dua mondmilito li ne plu aktivis en la landa movado. Okaze de la Universala Kongreso en Harlema (1954) li estis honora prezidanto de la Loka Kongresa Komitato kaj multe helpis per gravaj konsiloj kaj laboroj. Ankoraŭ en 1963 li akceptis la funkcion de prezidanto de la L.K.K. por la Univ. Kongreso en Hago (1964); kvankam tiam li mense estis ankoraŭ same humorplena, montriĝis jam lia korpa kadukiĝo. En la lastaj jaroj li grave surdiĝis kaj marŝis tre malfacile. Okaze de la kremacia solenaĵo parolis en

la nomo de L.E.E.N. s-ino E. Kerversvan Tholen, esprimante la dankon de la esperantistaro. Nia sincera kondolo iras al la funebrantaj edzino kaj gefiloj.

P. M. Mabesoone.

### Sekcio Hilversum.

Sekr.: *Jonkerweg 11.*

En la komenco de la antaŭa jaro la sekcio Hilversum promesis, dum unu jaro ŝpari por la Mabesoone-fondaĵo. Kiam ni malfermis la ŝpaskatolon okaze de la ĵus okazinta jarkunveno, montriĝis, ke ĝi enhavas preskaŭ f 25,—. Ĉu imitinda ekzemple por aliaj sekcioj?

### H. OOSTHOEK †

4-7-1897 7-1-1967

La 7-an de januaro 1967 mortis samideano H. Oosthoek. En li la movado perdas aktivan kunlaboranton. En la diversaj lokoj kie li loĝis (Vlissingen, Haarlem) li gvidis kursojn kaj kiam li ekloĝis en Rotterdam li baldaŭ daŭrigis tiun laboron. Krome li aktive partoprenis en la laboroj de aliaj fakoj. Li estis estrarano de la grupo „Merkurio”, li dum kelkaj jaroj estis kunlaborinto en la Oficejo de UEA en Rotterdam, li prizorgis longan tempon la „Persdienst” de L.E.E.N. kaj estis unu el la organizintoj de la LEEN-kongreso en Rotterdam en 1952. Li ankaŭ partoprenis diversajn internaciajn kongresojn. H. Oosthoek estis laborema homo kaj bona amiko.

Ni konservos pri li bonan rememoron.

Niaj kondolencoj iras al la edzino kaj filino, kiuj perdis eminentan edzon kaj patron. Ni deziras al ili ĉion bonan.

Br.

*Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.*

**Manuskriptojn por la maja numero oni ensendu antaŭ la 1-a de aprilo!**

## DORSE KONTRAŬ LA MURO

En dudek ĉapitroj, verkitaj de unu el la tiama ĉefroluloj, oni informiĝas pri la rezistado en Frislando dum la dua mondmilito.

Libroservo L.E.E.N. — Ĝirkonto 7 69 15 — Leeuwarden.

### ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENO-KOMITATO

#### JARRAPORTO 1966.

En la kunmeto de la komitato ankaŭ ĉi tiun jaron ne venis ŝanĝo.

Prezidanto estis: Sinjorino E. Burgler—Jeszó. Sekretariino/kasistino: Fraŭlino H. M. Mulder.

Delegito de la Ministro de Instruado kaj Sciencoj: S-ro D-ro J. M. van Buytenen. La ekzameno okazis je sabato, la 28-a de majo 1966.

*Ekzamenantoj estis:*

la sinjorinoj

E. Burgler-Jeszó kaj A. C. Obbes,

la sinjoroj

F. Faulhaber, F. Weeke, J. S. Jansen, J. U. Hommes, F. N. Beemsterboer, J. D. Brakel, J. Ph. Punt, R. van Spronsen, Drs. F. v.d. Oudewetering.

#### Anoncis

Partoj:	Aliĝis	sin	Sukcesis
Ekzameno E.	18	18	12 67%
Ekzameno M.	13	13	12 92%
Ekzameno S.	6	6	5 84%

Ni ĝojas, ke por la S-diplomo ekzistas sufiĉe granda interesiĝo, tamen ni bedaŭras, ke la kandidatoj ne donas al si pli da peno por transdoni taŭgajn tradukojn. La nivelo estis seniluziiga. Ĉe la parola ekzameno oni nur povis doni al unu kandidato la ciferon 9; la sama bildo sin montris ĉe la E-kandidatoj.

*La meze akirita prijugo estis ĉe la*

E - Ekzameno: 7-

M - Ekzameno: 7

S - Ekzameno: 6,6

Ĉar la postuloj ne estas multe tro altaj, la komitato opinias necese urĝe peti kaj al la estontaj kandidatoj kaj al la kursgvidantoj doni pli da atento al la tradukoj kiel al la fakoj: Historio kaj Organizo kaj Kono de la literaturo.

(Subskr.) E. Burgler-Jeszó, prez.

### ESPERANTO-KURSO!

En la februaro-numero de la revuo „t Buitenspoor”, organo de la Nederlanda Turistklubo de Kampadistoj, ĉi-jare startis Esperanto-Kurso, verkita de nia prezidanto S-ro Kervers. La eldonkvanto de la organo estas 3000, proksimume, do sufiĉe vasta legantaro. Atentigu viajn konatojn je tiu kurso kaj la ebleco sekvi ĝin iĝante membro de la asocio. La relativa granda spaco, kiun okupas la teksto de la kurso kaj ĝia kvalita enhavo meritas, ke ni publicu ĝin.

Adreso: Daendelsstraat 11, Den Haag.

### RADIO-SERVO F.E.N.

BBC provizore daŭrigas la Esperanto-elsendojn (por Bulgarujo) ĝis marto 1967 inkluzive. La lastan jaŭdon de la monato de ± 22.30-a ĝis ± 22.40-a horo. Ondolongoj: 30.7 m; 41.3 m; 50.1 m (9770, 7260, 5990 kHz). Bedaŭrinde en Nederlando ĝi estas tre malfacile kaptebla.

PRAHA denove elsendas (dum por-Germanuja programo) ĉiun merkredon de 9.30-a ĝis 9.45-a horo je 31.6 m kaj 49.6 m (9505 kaj 6055 kHz).

VIENO ŝanĝiĝis. Nun elsendas ĉiun vendredon de 15.30-a ĝis 15.40-a horo je 25.5 m kaj 203 m (11785 kaj 1475 kHz). ROMA plimalfruiĝis. Nun elsendas dimanĉe de la 21.00-a ĝis la 21.20-a horo. Krome oni aldonis ondolongon: 50,08 m (5990 kHz).

Bö.

### KORESPONDPETOJ.

S-ro Stanislaw Czesnowicz, GDYNIA-2, P.O. Box 13, Pollando, dez. korespondi.

Infanoj el Orient-Eŭropo ŝatas kor. kun Ned. geamikoj. Aĝoj ĉ. 10 jaroj, (unu knabino 16). Adresoj haveblaj ĉe: S-ro J. K. Hammer, Wibaustraat 49, ZAADAM (post 1 aprilo: Taxusstraat 7).

Sekcio de Hungaraj Filatelistoj Esperantistoj serĉas kontaktojn kun alilandaj filatelistoj. Adreso: Népköztársaság u. 3, BUDAPEST VI, Hongarujo.

## KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ.

**Dutaga restado sur la insulo Tekselo, la 6-an kaj la 7-an de majo 1967-a.**

**Sabaton.** Foriro el Den Helder je duono post la deka.

Alveninte sur Tekselo ni iros per aŭtobuso al la vilaĝo Den Hoorn, kie estos nia pensio „Happy Days”.

Posttagmeze al la birdkovejo „De Geul” (je la dua).

Post la vespermanĝo okazos Teksela Vespero!

**Dimanĉon.** Por tiuj personoj, kiuj volas partopreni unu tagon! Foriro el Den Helder je *duono post la naŭa*.

Ĉe la boato sur Tekselo estos aŭtobuso. Per la sama aŭtobuso ni veturos tra la vilaĝoj kaj dunoj sur la insulo. Intertempe ni havos lunĉon.

Forveturo je la kvina posttagmeze.

**Kostoj** por la tuta semajnfino: *f* 25,— entute. Nur por dimanĉo: *f* 15,— entute (sur Tekselo!).

Al la partoprenontoj ni sendos detalan programon. Anoncado antaŭ la unua de aprilo ĉe la kasistino de „La Norda Stelo”:

S-ino A. Tiessen-Spaans,  
Warmoesstraat 59,  
DEN BURG - Texel.

### 20-a KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA EN 1967.

La ĉijara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en TORRE PELLICE, ITALUJO, de la 22-a ĝis la 29-a de julio, kio donas la eblecon, poste ĉeesti la U.K. en Tel Aviv.

Nia kongreso okazos en la centro Valdesa t.e. la centro de la Protestantoj en Italujo.

Torre Pellice situas okcidente de Torino, ĉe la piedo de la Alpoj. La regiono estas tre pitoreska kaj multe vizitata de turistoj.

Tial estas necese frue aliĝi, por ke ni sciu, kiom da litoj ni devos rezervi. Post la 1-a de junio ni ne plu povos akcepti aliĝojn.

La kotizoj por partopreno de la kongreso kun tranoktado, manĝado kaj unu tuttaga ekskurso sumiĝas:

1. Kongresano 130 ned. gd.
2. Edz(in)o de kongresano 115 ned. gld.
3. junulo ĝis 20 jaroj kun propraj enspezoj 125 ned. gld.
4. junulo ĝis 20 jaroj sen propraj enspezoj 115 ned. gld.

**RABATO:** Membroj de KELI de la kategorioj 1,3 kaj 4 rajtas rabaton de 10 ned. gld.  
Edz(in)o de membro de KELI, kategorio 2, rajtas rabaton de 5 ned. gld.

Plajn informojn donos al vi:

F-ino Putto,  
Schaapsweg 139,  
EDE (Gld.) NEDERLANDO.

### FERIAJ ESPERANTO-KURSOJ EN HELSINGÖR, DANLANDO.

Ankaŭ ĉi tiun jaron okazos la konataj feriaj kursoj en Helsingör, nome de 23—30 julio. Vidu la anoncon en tiu ĉi numero.

### S.A.T.-Kongreso.

La 40-a Kongreso de S.A.T. okazos de 29 julio ĝis 5 aŭgusto en MALMÖ, Svedio. Petu aliĝilon kun informoj al la sekretaria adreso: S-ino Elsa Johansson, Värnhemsgatan 2 A III, MALMÖ-O, Svedio.

### SKIFERIO.

De la 26-a de decembro 1966 ĝis la 5-a de januaro 1967 okazis por la 10-a fojo la Svisa Esperanta Skiferio en Adelboden.

Kun grupo de 11 personoj ni ĝuis la diversajn eblecojn de la vintra amuzo.

Dum la longaj vesperoj oni montris lumbildojn de alpinismo kaj de vojaĝoj tra Eŭropo. Krome oni diskutis pri diversaj fakaj temoj.

La Silvestran Vesperon ni festis kiel la vesperon de Sankt-Nikolao kun diversaj donacoj.

Entute ĝoja skiferio (sen gravaj akcidentoj), dank' al ges-roj Gacond, al kiuj mi ŝatas diri: Ĝis sekvonta fojo!

Edo Woessink.

## TRA LA LIBRARO.

*ESPERANTO* de G. H. Benink. Eld. de *Eldonejo H. Stam Haarlem N.V., Zijlweg 1, Haarlem. 160 p., 16 x 24 cm., broŝurita, 3-a reviziita eldono. Prezo: gld. 9,— mendinte 20 aŭ pli ekz. oni pagas po gld. 8,10.*

Antaŭ la milito ekzistis „Beknopt leerboek Esperanto” kaj „Esperanto Leerboek”, verkitaj de f-ino Benink. Ambaŭ verkoj atingis duan eldonon, kvankam en la malnova tempo estis multaj aliaj lernolibroj. Tio signifas, ke oni ŝatas la librojn de G. H. Benink. Bedaŭrinde ili jam de longe ne estis plu haveblaj.

Jen, la ĵus aperinta „Esperanto” estas la tria eldono de la antaŭmilita „Esperanto Leerboek”. Laŭ nia opinio oni povus uzi ĝin kiel lernolibron, se oni ŝatus la metodon nerekte, nur en mezgradaj lernejoj. La nuntempaj lernantoj de la elementaj lernejoj ĝenerale ankoraŭ nenion scias pri gramatiko kaj la aŭtorino uzas la gramatikajn nomojn sen aldoni de iliaj klarigoj.

Kiel lernolibro por meminstruado ĝi ne taŭgas, escepte se oni regas la nederlandan gramatikon. Kaj modernan libron bazitan sur la scienca vortfrekvenco oni ne postulu de lernolibroj, kiuj aperis antaŭ la milito.

Estus pli bone ke en la estonta 4-a eldono la elparoloj de la vokaloj e kaj o (pĝ 9) ne estu tiel nuance fiksataj. E kiel en la vorto „bel” kaj O kiel en la vorto „zot” sufiĉas. La libro pritraktas ± 2300 vortojn. Vortojn kiel „kuskuto” kaj „ĉirkaŭmano” por brakringo aŭ braceleto (pĝ 140) oni estonte forlasu.

Pri la gradiĝo de la malfacilaĵoj ni preferas i.a. ke studentoj tuj konatiĝu kun la praktika demanda frazo kaj ne en la 23-a leciono post la subjunktivo.

Bedaŭrinde preseraroj ne mankas: pĝ 25 vaiajn, pĝ 32 dormieti, pĝ 52 nikklo, pĝ 56 botfaristo = laarzenmakerij, pĝ 102 falŝlrnilo, pĝ 116 drori.

Plue ni preferas uzi la formojn Rejno, Sa Gothard, ankataŭ la Rejno, la St. Gotthard kun artikolo antaŭ nomoj.

Spite de rimarkigoj ĉi-supraj oni ne konkludu, ke la libro ne estas uzebla, precipe en la nuna tempo, kiam lernolibroj por niaj ekzamenoj ne abundas. La rezultato de la instruado unualoke dependas de la instruisto kaj nun ni havas profesiajn in-

struistojn kun la diplomo Esperanto-L.O. Ili havas la planan rajton plibonigi aŭ aliordigi lecionojn aŭ alimaniere klarigi malfacilaĵojn, k.t.p. Bonajn ecojn la libro de Benink havas. En ĝi estas multaj tradukekzercoj, kiuj estas necesegaj por ekzamenoj. La libro konsistas el 61 lecionoj kun entute 61 x 4 = 244 tradukekzercoj. La du unuaj (a,b) de ĉiu leciono — estantaj esperantaj frazoj — certe donos al la lernantoj fortan apogon, pro kio ili povos pli bone kompreni la antaŭe pritraktitan teorion. Ilin oni povus uzi ankaŭ kiel legaĵojn. En okazo de tempmanco sufiĉas ke oni de ĉiu leciono igu traduki nur du ekzercojn: Esp-Ned kaj Ned-Esp. Por kandidatoj de la E-ekzameno, sub bona gvidado, la lernolibron „Esperanto” ni povas rekomendi. En la manoj de L.O.-diplomitoj la libro certe trovos sian vojon. Al f-ino G. H. Benink nian dankon, ke ŝi ankoraŭ povas utiligi sian emeritecon por nia movado.

T. S. KHO.

*HIMNARO ESPERANTA, kompilita de Montagu C. Butler L.R.A.M. Eld. de la Kuratoroj de la Himnara Kaso, 1966. 16 x 19½ cm., 205 p., broŝurita, 5-a eldono. Prezo 6 ŝilingoj (12 steloj), afranko 6 pencoj (1 stelo). Mendebila ĉe la Sekretario-Kasisto S-ino D. A. Sinclair, 7 Bridle Rd., Bramcote, BEESTON, Nottingham, aŭ ĉe British Esperanto Association, 140 Holland Park Avenue, LONDON, W. 11.*

Tiu ĉi Himnaro, nun jam en kvina eldono estas certe la plej granda Kristana Himnaro, kiu ĝis nun aperis en Esperanto. En ĉi tiu eldono ĝi estas eĉ pligrandigita kaj reviziita.

La Himnaro servas jam dum multaj jaroj, kaj S-ro Montagu C. Butler faris grandegan laboron por tio.

Ĉar ĝi estas unualoke destinita por la Protestantaj Diservoj en Britujo, la pli granda parto de la himnoj estas de brita deveno.

Tamen ankaŭ en alilandaj diservoj oni uzas ĉi tiun Himnaron. Ĝi enhavas ankaŭ muziknotojn, kvankam ne ĉe ĉiu himno. Pluraj esperantistaj kantoj troviĝas en ĝi, tiel ke ĝi taŭgas ankaŭ por Esperanto-kunvenoj.

Tiu ĉi nova eldono de la „Himnaro Esperanta” certe trovos sian vojon. La preso estas bona kaj klara; la formato prak-

tika kaj taŭga por la poŝo.  
Entute: valora eldono!

T. P.

*SIMPLAJ FLOROJ, Melodioj kaj Tekstoj de Ramona van Dalsem, Akomponaĵoj de Toos Schoonman kaj Kees Olthuis. Eld. Dansk Esperanto - Forlag, Inge-mannsvej 9, Abyhøj, Danlando, 1966. 26 p., 15 x 21 cm., broŝurita. Prezo: 9,— dkr. (gld. 4,75). Havebla ĉe nia libroser-vo.*

Ĉi tiu, sur bonkvalita papero presita kantararo enhavas dek ĉarmajn kantojn, parte jam konataj de la nederlandaj Esperantistoj, kiuj aŭdis kanti ilin de la verkistino mem. Ili estas vere „simplaj floroj, kiujn plukis Sinjorino Van Dalsem el sia koro kaj donacas al ni je memoro”. La tekstoj ĉiuj enhavas fundamentan ideon, kiu donas al la aŭskultantoj varman senton. La melodioj tute prave subtenas la tekstojn kaj la akompanaĵoj ilustras kaj ankoraŭ pli ĉarmigas ilin, tiel ke ili formas riĉan unuecon. Vasta publiko ŝatos aŭdi ilin kaj ankaŭ mem kanti ilin kaj ni povas nur gratuli la eldoniston, kaj ni esperas ke la libreto trovos la vojon al ĉiuj Esperantistoj. Sed ankaŭ por ne-Esperantistoj ĝi estas bona kaj taŭga propagandilo. Ni esperas, ke venos pli da tiaj libretoj. Ni bezonas kantojn kun ĝoja vivseriozeco.

Nur malgrandaj prezeraroj troviĝas en ĝi, sed ili tute ne ĝenas. La literoj estas sufiĉe malgrandaj, tiel eĉ, ke la recenzintino devis unue aĉeti okulvitrojn! Tamen ŝi tutkore rekomendas ĉi tiun kantbuke-don.

J. T. Koopmans-Schotanus.

*VOJAĜO INTER LA TEMPOJ, gramatika studo, de Kálmán Kalocsay. Stafeto: Movado-4; 200 p., 16 x 22 cm. Eldonis J. Régulo, Kanariaj Insuloj. Prezo, nur broŝurita: \$ 2,40.*

La leganto jam konjektas pri kio temas; ĝi estas la tioma verko pri la ata/ita-afero. En sia enkonduko la aŭtoro nomas la libreton „Esperanto-moderna lingvo”

bonvena por plua diskuto. Tio sonas kva-zaŭ promeso trakti la temon objektivite. Kaj efektive, la tono de la verko estas, kvankam decida, tamen simpatia kaj ne akra kiel en „Simpozio”.

Dediĉinte atenton al siaj diversaj opanantoj, Kalocsay diras: „La kazoj en kiuj ili (la du sistemoj D.) diverĝas, relative estas malmultaj”. Tre prave! Sed kial do oni faras tiom da bruo, diktatore altrudas kaj eĉ riskas skismon pri io ŝajne negrava! La du sistemojn, atismon kaj itismon, la aŭtoro nun baptas triopismo kaj simpoziismo. Ni prefere uzu la du jam konatajn nomojn.

Ne mirige estas ke Kalocsay prezentas la opiniojn de atistoj inter si malsamaj. Sed ĉu itistoj en ĉio samopiniis? Lingvistiko ja ne estas matematiko, kaj ankaŭ en Esperanto oni rajtas diference opini, kondiĉe ke oni ne tuŝu la fundamentajn regulojn. Krome: la sentoj ludas ofte pli gravan rolon ol rigora logiko, eĉ inter lingvistoj!

Per filozofia rezono Kalocsay venas al la konstato ke prezenco reale ne ekzistas. Ĝuste, sed ĉu ankaŭ preterito kaj futuro ne estas nur relativaj nocioj? Do, eĉ pli reale: ekzistas nur unu tempo! Trafan ekzemplon por argumenti sian teorion Kalocsay uzas: *trovas* senpere transiras al *trovis*. *Trovas*, almenaŭ en sia perfektiva senco, ne estas logika, ĉar la ago *trovi* estas reale nur sendimensia tempopunkto. Prave, prefere ni do uzu *trovas*, nek *trovata* en ĝia perfektiva senco. Sed en la ĉiutaga praktiko oni ne rezonas tiel, sed lasas sin gvidi de momenta sento, ekz.: *longe mi serĉis la perditan mone-ron, sed jen mi trovas ĝin en mia poŝo. Ĉu trovis?* Hiperlogike jes, sed laŭ la momenta sento ne!

Mi samopiniis kun la aŭtoro ke verboj, eĉ partcipaj finaĵoj, povas enhavi aspektan nocion; kaj ofte tempo kaj aspekto koincidas en unu formo. Do ne senbaze Kalocsay parolas pri la „degenkampa aspektismo”; sed tiu „aspektismo” estas nur agnosko de ekzistanta lingva fenomeno, ne kondukanta al arbitra sistemo konsideri la aspektojn kiel kriterion pli deci-

dan ol la Zamenhofaj reguloj pri tempoj. Sciante ke aspektoj ĉe lingvistike neinstruitaj homoj estas preskaŭ aŭ tute nekonaĵoj, Zamenhof ne senmotive evitis paroli pri ili. En parolo, eĉ en skribo, oni ne antaŭ ĉiu verbo demandas al si, ĉu temas pri verbo daŭra sen rezulto, verbo de rezulto sen daŭro aŭ verbo de daŭro kaj rezulto. Tio ne povus ne konduki al konfuziĝo kaj eĉ, kiel jam pruviĝis, al duboj inter lingvistoj mem.

La plua argumentado de Kalocsay pri la partcipoj ŝajnas al mi malpli konvinka kaj multe pli konfuza ol la enkonduka ekzemplo de *trovi* k.s.

Konkludo: ni do lasu al hiperlogikemuloj la liberon agi laŭ sia prefero, sed ili ne devigu nin agi simile. Imagu ke en kursoj ni devus antaŭe instrui la lernantojn pri aspektoj! Mi konjektas ke tiukaze preskaŭ ĉiuj lernantoj forirus por disdiri, ke Esperanto estas multe pli malfacila ol kiu ajn nacia lingvo. Kion ni antaŭ ĉio bezonas en nia movado, tio estas iom da toleremo al homoj opiniantaj alie ol ni mem. Kaj tiun ideon ni trovas esprimita en la kompromisaj vortoj de Jung en lia „Esperanta Konjugacio”.

Cetere, por gramatikemuloj kiuj ŝatas filozofiadon pri lingvaj problemoj „Vojaĝo inter la tempoj” estas tre rekomendinda studo. Sed mi sincere esperas ke nun la lastaj vortoj pri tiu ĉi tikla temo estas diritaj!

G. J. D.

### BHAGAVAD GITA en Esperanto.

Baldaŭ Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro aperigos la famkonatan BHAGAVAD GITA (Sublima Kanto) en traduko de Pandiá Pându laŭ la sanskrita originalo. Tiu 300 paĝo libro aperos en plaĉa formato (ĉ. 13½ x 18½ cm.) kun tekstoj sanskrita kaj esperanta.

### NOVA REVUO.

Ekde 1967 aperos nova revuo: „Esperanto-Turismo”. La revuo estos grandformata kun 24 paĝoj abunde ilustritaj, kelkaj eĉ en koloroj.

Ĝi aperas paralele al la „Aŭto-Revuo”, la konata organa de „Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista”. „Esperanto-Turismo” ne pritraktos aŭtomobilajn teknikajn problemojn, do sin direktos al ĉiuj, kiuj pritraktas turismon kaj havas intere-

son pri turismo en la plej larĝa senco. La abonprezo estas B. Fr. 70 aŭ 5. gld., pagota al Pĉ. no. 1700.10 de Maur. J. Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk (Antwerpen).

Abonantoj de „Esperanto-Turismo” povas akiri ankaŭ abonon al „Aŭto-Revuo” je B. Fr. 35 (duono de la ordinara prezo).

### NI RICEVIS:

ANGERS-France, faldfolio kun multaj koloraj ilustraĵoj. Kun Esperantlingva aldono. Supozeble havebla ĉe: Syndicat d'Initiatives, ANGERS (Maine et Loire), Francujo.

4 diversaj bildpoŝtkartoj el RIMINI (Italujo) kun bildflanke en Esperanto: Al la Esperantistoj dise en la mondo salutojn el „Rimini la marbordo de Eŭropo”. Inf. haveblaj ĉe: Azienda di Soggiorno, RIMINI - Italio.

Programo por la jaro 1967 de „La Esperantista Kulturdomo Kastelo Gresillon”, 49 BAUGÉ, Francujo. I.a. de 23 julio - 6 aŭgusto Internaciaj kaj Kulturaj Ferioj kun granda Ralio. Petu prospekton.

VIVU LA GRANDA PROLETA KULTURA REVOLUCIO, Ĉefartikolo de Hongqi (Ruĝa Flago) n-ro 8, 1966. 32 p., 9½ x 14½ cm. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Prezo: gld. 0,25.

**Esperanto en Komerco** - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.  
Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

Kiu esperantistino (prefere mez-aĝa) ŝatas akompani min al Hungarujo por ferii ĉe samideanino en Szeged dum 2-3 semajnoj en aŭgusto 1967? Skribu al f-ino W. C. van Nienes, Pasteurstraat 111, Den Helder, (tel. 2230-4173, nur vespere aŭ semajnfine).

**ESPERANTISTOJ, kiuj vere pensas kaj agas internacie havas la bezonon kaj devon esti membro-abonanto de U.E.A.**

*Petu pri tio informojn al la kasistino de L.E.E.N.*

## TIKLA PROBLEMO

Ja prave ni plendas ke ni ne trovas la atenton, kiun nia lingvo meritas. Esperanto havas multajn avantaĝojn; se ĝi havas kelkajn malavantaĝojn krome, ni rajtas supozi, ke tiuj pli malpli aŭtomate foriĝos dum larĝa uzo. Nia lingvo meritas la venkon, sed evidente ĝi staras antaŭ obstinaj baroj.

Ne tro rapide ni riproĉu aliajn homojn pro ilia miopa konduto. Antaŭ kelkaj tagoj min mem trafis tikla problemo, kiun mi ne povis solvi. La faktoj ŝajnas sufiĉe simplaj. Sub la titolo „Abramisme” mi verkis libron, kiu vendiĝis ek de meza februaro. Do mi demandis al mi, kiuj gazetoj ricevu recenzan ekzempleron. La libro verkiĝas en la Nederlanda, do la rilatoj al esp-o ne estas fortegaj. Tamen la rilato estas tre reala. Tutan ĉapitron mi dediĉis al kelkaj paĝoj el la libro „Lingvo kaj vivo” de Waringhien. Ie mi konfesas, ke mi inter la esp-istoj lernis kompreni la ideojn de Abraham. Mi klarigas, ke la rakonto pri la Babela turo estas protesto kontraŭ la naciisma lingvopolitiko de reĝo Sargon el Akkad. En la lasta ĉapitro mi pledetas por komuna lingvo por ĉiuj homoj. Mi ne volis pledegi, por eviti misefikon; tamen apude sur la kovrilo mi metis esp-an poemon de Baldur Ragnarsson.

Ĉio tio tamen estas kolekto el flankaj faktoj. Pli esence estas ke mi montras, kiel la batalo kontraŭ naciismo kaj fremdgenta ekspluato, batalo por intergenta solidareco, jam estas batalata de la tagoj de Abraham ĝis nun. Mi povus diri, ke Abraham estas la fondinto de la homaranismo. Tiu ismo de post Moŝeo vivis sub la formoj de judismo, kristanismo kaj kelkaj aliaj ismoj. La libro do estas kontribuaĵo al la teorio de la esp.-ismo. Jen do la cirkonstancoj; nun la tikla problemo. La eldonisto difinis certan kvanton por recenzaj ekzempleroj. Mi povas konsili kelkajn specialajn gazetojn, sed evidente mi ne povas dissendigi recenzajn ekzemplerojn senlime. Se mi volus sendigi ekzempleron al esp-a gazeto en Nederlando, al kiu gazeto mi sendigu ĝin? Mi ja ne povas elekti unu gazeton kaj neglekti la aliajn en Flandrujo aŭ Nederlando. Ŝajnas al mi ke la eldonisto devas sendi inter kvin kaj dek recenzajn ekzemplerojn aŭ neniu. Ĉar mi ne kuraĝas proponi al la eldonisto ke li dissen-

## ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMEN-KOMITATO

Ekzamentaskoj 1966.

S1. Amersfoort, 28 majo 1966.  
Traduku (2 horoj).

Neniu popolo improvizas sian arton, sian religian spiriton, siajn sociajn kaj edukajn konceptojn, sian pasion por diciplino aŭ libero, aŭ eĉ sintenon al la milito aŭ la morto.

Ĉiuj laboras sur antikvaj temoj, kaj progresas, se eble, laŭ la manieroj de pensado kaj agado, kiuj estas truditaj al ĉiu familio kaj ĉiu lernejo, en la vendoplaco kaj la ludejo, en la kampo kaj la fabriko, en la kutimoj kaj la lingvo.

Kaj ĉar estas la privilegio de artaĵoj esprimi ĉi tiujn interesojn, ĉi tiujn konceptojn, ĉi tiujn manierojn de estado - kaj ilin esprimi tiel bone, ke la artaĵo ŝajne donas al ili moralan bazon - kulturaj valoroj estas tradukeblaj kaj transdoneblaj.

„Oriento kaj Okcidento” paĝo 32.

Priskribi la historion de la infanaĝo kiel tiun de la maturaĝo estas falsigo. La tute vekiginta povas nur perforte rakonti sonĝon, kiel li vere travivis ĝin.

Alte super la kapo de la infano pasas la fluo de la grandaj okazaĵoj. Nur gute kaj ne kontinue ĝi ricevas percepton pri ĝiaj kirloj. Ĝuste tiu nekapablo vidi la interligon igas la realon sonĝeca.

En la longa sonĝo de la infanaĝo regas arbitra, neesplorable kaj tropotenca sorto, malŝparema kiel la feino kun la sorĉvergo ĉe la lulilo de la princino aŭ kruela kiel la lupoj en la fabelo pri Ruĝĉapulinjo.

La ombro de tiu sorto falas ankaŭ sur la jarojn de la maturaĝo. Ĝia fantombildo persekutas nin eĉ tiam kiam ni komencas konscie direkti la okazaĵojn de nia vivo. Nur malmultaj elektitoj de la libero vere akordiĝas kun siaj feinoj kaj monstroj.

„Sveda Antologio” paĝo 364/365.

du tian kvanton, mi decidis silenti pri la afero. Kiu scias bonan solvon por la problemoj?

Prof. d-ro inĝ. G. Hamming.

## KONCIZE

### Esperanto-sekcio ĉe Eŭratom (Petten).

La germana inĝeniero Dieter W. Klage estas gvidanto de la Esperanto-sekcio ĉe „Euratom” en Petten (N.-H.), Nederlando.

### Enciklopedio de monda literaturo.

Germana firmo komencis eldoni enciklopedion de la monda literaturo ekde la plej fruaj tempoj ĝia la hodiaŭa epoko. La enciklopedio konsistas el ses volumoj kaj enhavas ĉ. 18.000 artikolojn de pli ol 300 aŭtoroj, apartan indekson de la aŭtoroj kaj resumajn priskribojn de pli ol 130 naciaj literaturoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

### Usona televidartisto pledas por Esperanto.

Al David McCallum, ĉefrolanto de la televidserio „The man from UNCLE” oni dum intervjuo demandis: „Se vi po-

vus ŝanĝi ion ajn en la mond-situacio, kion vi ŝanĝus?”. Li respondis: „Mi insistus kaj forte proponus, ke oni instruu Esperanton al ĉiu infano en la mondo, por ke en unu generacio ni sukcesu havi plenan interkomprenon”. (Laŭ „ESPERANTO” de febr. 1967).

En Nederlando oni povas vidi la serion en la programo de AVRO.

### Novaperonta verko de Vilho Setälä.

Aperos en libroformo kolekto de artikoloj, eseoj kaj beletraj verkaĵetoj, originalaj kaj tradukoj, de la konata finna Esperantisto Vilho Setälä.

La ĉ. 200-paĝa libro aperos en aprilo sub la titolo „Fortoj de l' Vivo” ĉe: Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, IRISLAHTI, Finnlando. La prezo por bindita ekz. estos 32 steloj.

### Nova Esperanto-poŝtmarko eldonota en Izraelo.

Okaze de la Universala Kongreso la Izraela Ministerio pri Poŝtaj Aferoj decidis eldoni specialan memorigan poŝtmarkon.

## AANMELDINGSFORMULIER

(Duidelijk invullen, liefst met drukletters)

Inzenden 6 weken vóór het examen, als brief aan de secretaris-penningmeester:  
G. ELLERMAN,  
De Clercqstraat 42, Amsterdam-Oud-W.

De examens voor diploma E, M en S vinden plaats te Amersfoort zaterdag 13 mei 1967.

DE KOSTEN VOOR DEELNEMING ZIJN: Voor examens E f 12,—, voor examens M f 16,—, voor examens S f 20,—.

Voor hen, die lid zijn van een der organiserende verenigingen of van NoSoBE respectievelijk f 7,50, f 10,— en f 12,50; voor werkloze leden de helft; kinderen (tot 18 jaar) van leden betalen eveneens de helft. Kandidaten, die de eerste keer niet slagen, kunnen binnen 1 jaar deelnemen aan een volgend examen, waarbij vrijstelling wordt verkregen voor vakken, waarin minstens een 8 is behaald.

Aanmelding voor het examen E / M / S.  
(doorhalen wat niet verlangd wordt)

waarvoor hij/zij het verschuldigde bedrag per postgiro no. 20 61 52 heeft overgemaakt.

1. Naam : .....
  2. Voornamen : .....
  3. Adres : .....
  4. Te : .....
  5. Beroep : .....
  6. Datum en jaar van geboorte: .....
  7. Plaats van geboorte : .....
  8. Lid van de landelijke Esp.-ver.: .....
- Bestudeerde literatuur (alleen voor M- en S-kandidaten): .....

## NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Prez.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.

Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.

Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtgirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.  
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

### LA KOMENCANTO



door  
G. P. DE BRUIN

Geheel bewerkt door:

F. FAULHABER  
en  
A. M. D. KORFF

ACHTSTE DRUK  
UITGAVE F. L. E.  
AMSTERDAM

„Voor Esperanto-onderwijs op ULO-scholen tot dusver het best verschenen boek. Voor VGLO-scholen zou ik liever een geheel directe methode nemen, b.v. „Sub la verda Standardo”, die iets gemakkelijker is”.

Overgenomen uit „Ons Muloblad, wekelijks orgaan van de Vereniging van Christelijke Mulo en de Bond van Chr. Mulo-scholen”.

In geplastificeerd omslag f 3,90  
(Voor schoolgebruik 20% korting).

**Boekendienst F.L.E.,  
Marnixstraat 57, Haarlem.  
Telefoon 0 2500-65417.**

### **HUNGARAJ VERKOJ**

La Homa Tragedio; eposo hungara . . . . . f 8,—  
Dudek Horoj; kroniko pri gravaj momentoj . . . . . f 6,90  
Vuk; kateniga, streĉiga . . . . . f 5,50

*Mendu ĉe la Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.  
Girkonto 7 69 15.*